DIA REGNO

DIA REGNO

✪ dumonata kristana revuo en esperanto ✪ N-ro 4 (835) 2002 ✪

ISSN 0167-9554

De Zagreb al Berekfürdő

Éva FARKAS prezentas en Zagrebo la baldaŭan kongresejon de KELI: Berekfürdő. (fotis PC)

Ortodoksio

Kion prediki?

Diversaj informoj

Raporto pri... Zagreb

KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia fondita en 1911, neneŭtrala, kunlaboranta kun UEA

Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Jacques TUINDER
✉ Henegouwenlaan 35, NL 1966 RH Heemskeerk ✆+31 251 231941;
💻 d.tuinder-dekker@wolmail.nl

Sekretario: Els VAN DIJK-KUPERUS
✉ Koningsmantel 4, NL 2403 HZ Alphen a/d Rijn, Nederlando; ✆+31 1724 20222;
💻 j.a.van.dijk@hetnet.nl

Kasisto: Siegfried KRÜGER
✉ Dinkelsbühler Str. 12, DE 74074 Heilbronn, Germanio; ✆+49 7131 162688;
💻 slkrueger@gmx.de

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume € 20,- ✪ Membro-subtenanto € 30,- ✪ Nura abono: pagante rekte al KELI € 16,- ✪ pagante al Libroservo € 18,- Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI ✪ Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI ✪Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI: 5506132.

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908 dumonata revuo — ISSN 0167-9554

Redaktoro: Philippe COUSSON
✉ 26 rue de Pré-Ventenet, FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆+33 (0)5 49 46 80 21;
💻 diaregno@altern.com.

Abonprezo sen membreco en KELI: € 16,- aŭ egalvaloro. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe, ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la Redaktoro.

Enpaĝigo, grafika prilaboro, presado kaj ekspedado:

Eldonejo **hejme** Kazimierz LEJA
✉ pf. 59, PL 41-250 Czeladź, Pollando
✆+48 32 763 37 12; 💻 kleja@demo.pl

ENHAVTABELO

75 Vivo de la rusa ortodoksa (pravoslava) eklezio
77 Pri kiu predikis Filipo?
82 Esperantistaj informoj
87 Diversaj raportoj de Jacques
90 Raporto pri Zagreb 2001

REDAKTORAJ VORTOJ

Somero

Somero estas tempo de ripozo, kaj ankaŭ de reordigo de diversaj aferoj. Mi do profitis la gajnitan tempon por reordigi aferojn en mia kontoro. Mi do retrovis stakon da aferoj, kiuj atendis ĝuste tiun liberan tempon kiun nur po malgranda kvanto mi disponis en la cetero de la jaro, kaj jen, inter ili troviĝis la raporto, kiun certe diligente sendis al mi Britta. Mi esperas, ke ŝi pardonos al mi la prokrastigon de ĝia apero.

Mi inter tiu stako da folioj trovis kelkajn paperajn kontribuojn, kiujn mi nur parte povis finfine enkomputiligi. Restas ankoraŭ kelkaj tiaj, sed tamen tre malmulte. Kaj mia stoko da kontribuaĵoj por la revuo ege malpliiĝis. Dum kelkaj periodoj, mi havis pretan materialon por kroma numero kiam mi pretigis unu, sed hodiaŭ certe ne.

Ĉu la kristanaj esperantistoj havas nenion por diri? Mi esperis reagojn al diversaj artikoloj kaj leteroj, sed tro malmulte alvenis. Mi ĉiam diras la samon: *Tiu revuo estas la via. Ĝi estos kiel vi faras ĝin. Se io mankas, estigu ĝin. Se io troas, reagu.*

Plej kore kaj frate en nia Sinjoro Jesuo Kristo

Philippe COUSSON

EKLEZIO

ORTODOKSA EKLEZIO, PRAVOSLAVA EKLEZIO, KAJ ESPERANTO

En la revuo *Dia Regno* 2/2002 estis publikigita la artikolo *Esperanto kaj Ortodoksa Eklezio*, kies materialoj estis prenitaj el la *Enciklopedio de Esperanto* (represita de la unua eldono 1933) en 1986.

La aŭtoroj proponas uzi la materialojn praktike.

Antaŭ ĉio mi volas respondi al la demando pri la bulteno *Ortodoksa Heroldo*. Ĝis la jaro 2001 mi provis (eble ne tro sukcese) tajpi kelkajn ekzemplerojn de la bulteno kvarfoje dum la jaro. En la jaro 1992, kiam startis reformoj de nia lando pri la ŝanĝoj en la eklezia vivo de nia lando, interesiĝis multaj homoj. Tamen pro multekosta korespondado regule mi sendis ilin nur al sinjoro Bohdan WASILEWSKI el Pollando, kiu ankaŭ havas pravoslavajn geamikojn. Miaj artikoloj en la bultenoj koncernis precipe historian evoluon de la rusa Pravoslava Eklezio, la vivon de la sanktuloj kaj preĝoj (ankaŭ akatestojn kaj kanonojn).

Rusaj esperantistoj nun povas legi multe pri la historia kaj kultura vivo en nia Eklezio en pravoslava literaturo (gazetaro, libroj), kiu abundas en la bibliotekoj kaj butikoj de ĉiuj preĝejoj. Ili povas traduki artikolojn en esperanton kaj konatigi eksterlandajn esperantistojn kun ili.

Ĉar nun perskriba poŝta komunikado fariĝis granda lukso (pro la altaj prezoj je kovertoj eksterlanden), mi la duan jaron preparas artikolojn rekte por *Dia Regno*, ĉar per la revuo eksterlandaj esperantistoj povas legi pri nia historio kaj nuntempa kristana vivo.

Nun mi volas diskuti la temon *Lingvo kaj Eklezio*.

Pri la grava fakto de lingvo en Eklezio oni povas legi en la ĉapitro 14 del Korintanoj. En Rusio komence de la baptiĝo de la princo Vladimir en la jaro 988, la Eklezia lingvo estis malnov-slava. Rusoj kiel aliaj slavaj popoloj ĉiam honoris Cirilon kaj Metodon, kiuj donis al ili alfabeton kaj tradukis la Biblion en la malnov-slavan lingvon. Ankaŭ nuntempe la rusa Ortodoksia (pli ĝuste Pravoslava) eklezio subtenas la malnovan lingvon kaj malnovan (Julian) kalendaron. Tamen, ankaŭ nun kiel en pasinteco aperas en nia lando modernistoj (inter ili estas sinjoroj KOĈETKOV kaj BORISOV), kiuj volas ŝanĝi ion en la Eklezio: ili proponas modernan rusan lingvon, gregorianan kalendaron kaj eĉ pli seriozajn ŝanĝojn.

La veraj rusaj kristanoj, kiuj legas verkojn de la sanktuloj Serafim SAROVSKI, Ioann KRONŜTADSKIJ, Ignatij BRJANĈANINOV kaj aliaj, strikte observas la leĝojn de la Rusa Pravoslava Eklezio (RPE), kiu estas la Panjo por ni, same kiel Dio estas nia Patro. Do, ili neniam konsentos kun la modernistoj fari iujn ŝanĝojn. Nia Eklezio estas eble pli konservativa ol la lando Britio.

Tial, se inter rusaj pastroj komence de la pasinta jarcento estis esperantistoj, kiuj evi-

Gelernantoj de dimanĉa lernejo en Jekaterinburgo (loka gazeto)

Sankta Johano Kronstadskij (ikono)

dente ne regule povis celebri Diservojn en Esperanto, tio ne estis normo por la Eklezio.

Ĉar mi pensas, ke se ne ĉiuj akumulitaj dum 900 jaroj, Ekleziaj libroj de la Pravoslava Eklezio estis tradukitaj en Esperanton, ĉu oni nomus tiun eklezion Esperantista Ortokoksia Eklezio? Se tiu Eklezio ekzistus, ĝi estus nur malbona kopio de la vera rusa Pravoslava Eklezio. Krom tio, same kiel Cirilo kaj Metodo, ni devus anonci Zamenhofon sanktulo. Tion certe ne subtenus tiuj kristanoj-esperantistoj, kies Eklezio ne havas sanktulojn.

Estas alia demando: Ĉu esperantistoj-kristanoj devas propagandi Esperanton al kristanoj, kiuj jam apartenas al sia vera kaj unusola Eklezio, kaj pro tio ne volas ŝanĝi lingvon de la Eklezio, aŭ ĉu ili uzu la verajn ideojn de sia Eklezio por esprimi ilin per Esperanto al tiuj, kiuj ne apartenas al ĝi?

Same kiel Esperanto rilate al la rusa Pravoslava (Ortodoksia) Eklezio oni povas diri pri aliaj lingvoj. Ekzemple, en la urbo Nijnij Tagil loĝas ciganoj, armenoj, kiuj estas ortodoksiaj, tamen la lingvo en la Pravoslava preĝejo estas malnov-rusa, ne cigana, ne armena. Tamen en Armenio oni povas trovi Ortodoksiajn preĝejojn, kie Diservojn oni celebras armene.

Nun eĉ en nia urbo naciaj minoritatoj organizas siajn kulturajn societojn, sed se ili estas ortokoksiaj ili povas viziti nur rusan Pravoslavan Eklezion.

Larisa KUZMENKO

Larisa ankoraŭ aldonis gazetartikolon kaj la jenan komenton:

La artikolo *„Orkolora kupolo super Tagilo"* publikigita en nia loka gazeto *„Tagila laboristo"* estas dediĉita al al granda evento, kiu okazis en nia urbo fine de majo, kiam la kupolo, farita el la titana flava alojo, estis metita sur la templon, dediĉita al la festo de la Ĉieliro de nia Sinjoro Jesuo Kristo. Tio estas la plej granda kupolo de la preĝejo, kiu estis malfermita antaŭ pli ol dek jarojn post la Soveta periodo de senzorgeco, kiam la eksa katedralo staris duonruinigita.

Tiu katedralo kaj apud staranta malgran-

La episkopo de Jekaterinburgo antaŭ mirakla ikono (loka gazeto)

Procesio en la stratoj de Jekaterinburgo (loka gazeto)

da preĝejo, funkcianta ankaŭ dek jarojn, apartenis al la virina monaĥejo kaj estis konstruitaj fine de la 19a jarcento. en tiu tempo tie loĝis 114 monaĥinoj. Antaŭ kelkaj jaroj oni denove malfermis ĉi tie monaĥejon. Nun 8 monaĥinoj loĝas ĉi tie.

El Jekaterinburgo, la ĉefurbo de nia regiono, venis speciale por la evento la episkopo Vikentij, kiu aspergis la kupolon kaj aranĝis specialan Diservon. Ĉeestis ĉirkaŭ tricent homoj kune kun la urbestro kaj la aliaj gvidantoj de la urbo.

Larisa KUZMENKO

PRI LA KRISTANA OBEEMO

Kion ajn oni ordonos al vi faru sen protesto, volonte kvazaŭ tio estus la ordono de Dio. Metu profunden en vian koron la vorton kaj agu kiel ĝi inspiras vin. Ĉiujn ordonojn akceptu kvazaŭ senpere de Dio mem kaj faru ilin kiel Dia afero, kun fervoro kaj atento. Ĉar laŭ la Jeremia 48:10 „Malbenita estu tiu, kiu plenumas malĝuste la faron de la Eternulo, kaj malbenita estu tiu, kiu detenas sian glavon de sango".

La vera vojo al humileco estas obeemo kaj rezigno de sia volo. La alta opinio pri si mem estas malhelpo laŭ la vojo de vera obeemo.

Protopastro Sergio MINERVIN

TEOLOGIO

EN LA PROKSIMO DE LA BENITA DOKTORO

Estas malnova vero, ke vivo estas vojaĝo, eĉ rapida vojaĝo. En la preĝo de Moseo estas legebla: *„La daŭro de nia vivo estas sepdek jaroj, kaj ĉe forteco okdek jaroj; kaj ilia tuta majesto estas penado kaj suferado, ĉar ĝi forkuras rapide kaj ni forflugas"* (Psalmaro 90:10). *„Kvazaŭ ni flugus"*. Sed kien? *„Al la direkto de tombo"* oni diras. Sed se la tombo estus la fina celo de nia vivo, la tuta vivo egalus frenezan absurdon. Vere, la tombo estas finstacio ĉi tie sur la Tero. Estas certe, ke tie ni eltrajniĝas el la trajno de nia vivo. Se dum nia ĉiutaga vivo ni ekvojaĝas, ni ne vojaĝos al iu stacio, sed al iu urbo, vilaĝo, en kiu estas tiu stacio. Kiaspeca urbo estas tiu, kiu situas malantaŭ la stacio de tombo, kiel fincelo de nia vivovojo? La nomo de tiu urbo estas: *„Eterneco"*. Sur monton konstruitajn urbojn oni dispartigas je du partoj: suburbo kaj supra urbo. Same estas je la urbo de *„Eterneco"*. Ankaŭ tie estas suburbo kaj supra urbo. La supra urbo estas la urbo de lumo, la suburbo apartenas al nokto. El inter la du urboj ni vojaĝas al unu. Ĉu ni povas ĝoje vojaĝi? Tio dependas de tie, kien ni vojaĝas.

En la Agoj de la Apostoloj (8:26-40) oni legas pri homo, kiu ĝoje iris sian vojon. Kiu estas tiu homo? Influhava viro, havanta reputacion, bonan postenon. Li estis potenculo, eŭnuko de la reĝino de Etiopio, kiu havis grandan favoron de la reĝino.

Oni povus diri, ke ne estas miraklo,

ke *„tiu ĉi homo ĝoje iris sian vojon. Se iu havas altan rangon, tiu facile povas plenigi la vojaĝon per ĝojo."* Tamen ne tio faras ĝoja la homon de nia Vorto. Ne la bonstato donas daŭran ĝojon al la koro de la homo. Oni ofte konstatas, ke la nimbo, la rango, la posedaĵo povas fari la homojn malfeliĉaj.

Nur tio povas fari feliĉa la homon, se oni konas kaj amas Jesuon. La eŭnuko ne konis kaj ne amis Jesuon. Li estis pagano kaj iamaniere li kontaktiĝis kun la Judoj. Li altiriĝis al la juda religio, diris adiaŭon al siaj paganaj dioj.

Foje venis ideo en lian cerbon: laŭeble li vizitos la sanktan urbon Jerusalemo. Li ricevis permeson de la reĝino, kaj post longdaŭra vojaĝo li alvenis al la sankta urbo, en la centron de la religia vivo. En la sanktejo li pririgardis la oferaĵojn; aŭdis la sonoron de la sanktaj klarionoj, la floron de la pastroj, tamen ĉio ĉi ne kontentigis lin, sen ĝojo li reiris hejmen.

Tiu ĉi homo estas la bildo de miloj, kiuj sen ĝojo iras la vojon de sia vivo, precipe dum nia tempo. Aro da maljunuloj kaj junuloj en trista animstato marŝadas sur la vojo de la vivo. La mondo provas alporti ion al ili, provas prezenti distriĝon, sed tio ne egalas ĝojon. Oni povas fari al si distriĝon, sed ĝojon ne! La ĝojo devas naskiĝi. La ĝojo estas reĝino, la distriĝo estas karnavala reĝino. Dum la amuziĝo, la animo de homo povas plori kiel infano, kiu timas nokte kaj vokas sian patrinon. Tio okazas tra la vivo, kiam... Kiu scias, kiel baldaŭ? Kiom malproksime estas la tombejo de tiu ĉi loko, kie vi legas tiujn ĉi vortojn? Mi respondas al vi precize: je unu paŝo. Je unu paŝo, ĉar estas priskribita en la Biblio: *„...inter mi kaj la morto estas nur unu paŝo"* (1 Samuel 20:3b).

Kie estas ĝojo? Ne ekzistas! Kial ne ekzistas? Ĉar granda parto de la homaro neniam estis ĉe la fonto de la vera ĝojo. Ĉu ni? Ĉu vi?

Tiu eŭnuko el Jerusalemo reiras al sia naskiĝloko, sed ne kun granda ĝojo. La Vorto tamen parolas pri ĝojo. Fine, kiel li alvenis al ĝojo?

Oni povas diri: *„Facile, ja, li legis la libron de Jesaja el la Biblio, la evangelion de la Malnova Testamento. Ja, se iu ne konas la veran ĝojon, komencu legi la Biblion, kaj oni tuj trovos la ĝojon."* Tamen, tiu ĉi historio atestas, ke ĝi okazis ne tiel. Vere, li legis la Biblion, ne multon li ekhavis per tio. Liaj pensoj koncentriĝis, sed li senfidiĝis, ĉar ne estis klare por li, pri kiu la profeto parolas.

La Biblio mem pri tio ne helpas al la homo. La Biblio ne estas magia libro. Bedaŭrinde multaj opinias la Biblion magia libro. Se oni en sia vivo ekhavas iun malfacilaĵon, malbonon, oni prenas la Biblion, malfermas ĝin hazarde ie ajn kaj eklegas la Vorton, esperante, ke tie estos la vojo de la rifuĝo. Oni faras la Bibilion pagana magio.

Sed ni reiru al nia historio, al nia eŭnuko! Li ne komprenis la legitaĵon. Li bezonis klariganton. Tiu ĉi klariganto estis Filipo. Filipo ne povintus klarigi la Vorton sen la helpo de la Sankta Spirito.

Filipo enĉarigis la eŭnukon je la ordono de Dio. Komenciĝis la Diservo. La ĉaro fariĝis mirinda kirko, sekvis benita Diservo kun unusola aŭskultanto.

Ni taksas tion malmulte. Ni deziras plenŝtopitajn preĝejojn. Ni taksas la plej eminenta pastoro tiun, kies preĝejo estas plena. Tie ĉu ĉeestas ankaŭ la Sankta Spirito?

Kion predikis Filipo? Unuvorte laŭ la epizodo: Jesuon.

Ĉiu pastoro devas prediki Jesuon! Jesuo estu la centro de ĉiu prediko, alimaniere estas vane. Foje ĉe la komenco de Diservo iu pastoro trovis slipon sur la katedro kun la jena noto: „Sinjoro, ni volas vidi Jesuon!"

Filipo kiel predikis Jesuon? Tute precize ni scias, ĉar la epizodo prezentas: *„...komencante la Vorton..."*; nome tiun Vorton, la eŭnuko legis en Jesaja 53. Tiu Vorto temas pri Jesuo. Filipo predikis tiun Jesuon, Kiu mortis je la pardono de niaj pekoj, kaj Kiu eteme vivas. Kiel aŭskultis tion tiu homo! Ja, tion li bezonis, tio mankis en lia vivo! En tiu momento varmo kaj lumo estiĝis en li. Kiam Filipo komencis prediki al li pri la bapto kiel la signo kaj stampo de repuriĝo el la pekoj pere de la sango de Jesuo, tiam la renaskiĝinta homo sentis ardan sopiron por baptiĝi. Eĉ tiel okazis.

Ili ĵus preteriris rivereton, ekhaltis kaj eniris la akvon. Dum la baptoakvo fluis sur lian klinitan kapon, grandega ĝojo traverŝis lian koron, liaj okuloj brilegis. Lia vizaĝo emanis. Kvazaŭ senkonscie li rigardis al la ĉielo kun profunda danko. Li travivis la miraklon de la plena memtransdono al Jesuo.

Kiam ili supreniris el la akvo, la eŭnuko ne plu vidis Filipon, sed li ne ĉagreniĝis pro tio. Pli multe li havis ol Filipon, li trovis Jesuon.

Li daŭrigis sian vojon. La ĝojo estis lia kunvojaĝanto. Tiel li reiris al sia lando. Nigra estis lia haŭto, sed blanka lia animo, li repuriĝis en la sango de tiu Jesuo Kristo, Safido de Dio, pri Kiu Filipo predikis al li. *„Li iris sian vojon kun ĝojo."*

Same ni estas, se ni ekfrovis Jesuon. Ankaŭ ni iras kun ĝojo sur nia vojo. Tute ĝis la ĝojo de Etemeco.

KIAL NE ĜUI LA VIVON?

La biblia libro Predikanto estas al mi tre kara. Longe oni diskutis pri la demando, ĉu ĝi prave-malprave meritas lokon en la kanono de inspiritaj libroj. Kaj oni povas nur ĝoji, ke la rabenoj el la unua jarcento finfine decidis tion. Trafas ĉiun aŭdanton aŭ leganton, kiom emfazas la aŭtoro, jes preskaŭ per la forto de ordono, ke ni ĝuu la vivon. Mi opinias, ke ni komprenu kaj prenu tiujn vortojn nepre serioze! Ĉar la 'danĝero' prezentiĝas, ke homoj havas amason da okupoj, tro tristas aŭ eĉ tute forgesas ĝui...

Kio estas ĝui? Simple, ke oni trovu tempon por la bonaj aferoj, kiujn ofertas la vivo al ni, kiel ekzemple la rilatoj kaj kontaktoj kun ĉiuj niaj gekaruloj, sed ankaŭ nutraĵo kaj kompreneble la lumo, kiu vidigas niajn okulojn. Predikanto predikas: la lumo estas bona, servanta al sia destino. La taghelo kaj la sunradioj. Bone ke lumo ekzistas! Malbone ke milionoj ne vidas la sunleviĝon.

Tre bele Predikanto parolas pri la tempo: estas tempo por ridi kaj tempo por plori, tempo por planti kaj por rikolti. Tiun saĝecon oni nepre bezonas. Tro spontane kaj rapide oni pensas: mi estas freneze okupita.

➲

Ni preĝu: Mia Benita Doktoro! Mia malĝoja koro sopiras ĝojon. La ĝojo de tiu ĉi mondo estas efemera. Donu, ke mi trovu ĉe Vi eteman ĝojon neniam forpasantan. Amen.

D-ro Kálmán KÖRPÖLY
emerita kalvinana pastoro

Aperinta la 4an de februaro 2001 en la hungara revuo *„Reformátusok Lapja"*, laŭ buŝaj permesoj de la aŭtoro kaj de la ĉefredaktorino de tiu revuo.

ĈU VI KONAS PLI BELAN VERBON OL MEMORI?

La 21-an de septembro 1996 forpasis Henri NOUWEN. Ĉi tiu, en Nederlando naskiĝinta pastro, reputacias kiel unu el la plej grandaj spiritualaj aŭtoroj de la dudeka jarcento. Kiel profesoro li ade kaj ade forlasis la akademian medion por dividi sian vivon kun la marĝenuloj: kun enloĝantoj de kvartalaĉo en Limo (Peruo); kun aidesaj pacientoj; kun mensmalsanuloj en Arkeokomunumo en Toronto. Ĉi apudan pripensindan tekston mi ĉerpis el nederlandlingva kolekto da meditaĵoj „Hier en nu" (Lannoo, Tielt, 1999).

Ni ofte kaj klare konsciu pri tio, ke por ĉio estas aparta tempo. Ankaŭ por bone ripozi, ankaŭ por promeni tra la urbo, ankaŭ por ĉeesti kongreson, ĉijare en Hungario.

Okulfrapa estas la Predikanta rekantaĵo pri 'ĉio estas vantaĵo'. En la hebrea lingvo vantaĵo originas 'abel', laŭ la nomo de la frato de Kain. Sed Abel fakte signifas: maldensa, vapora, vundebla, tenera. Tre povas esti, ke ni tuŝas ĉi tie la esencon de nia religio. Sciu, ke eĉ alia traduko de la vorteto 'abel' eblas: spiro aŭ aero. Unuflanke ĝi estas neniel kaptebla, aliflanke: vivi sen aero neniu kapablas. Bone komprenu, ke Predikanto ne parolas pri vantaĵo en la senco de longa kaj fiera starado antaŭ flatanta spegulo (kiom bela, inteligenta, nobla knabo vi estas!).

Se mi bone sekvas la aŭtoron de la libro Predikanto, li volas akcenti, ke la vundebleco kaj la grandvaloreco de la vivo estas du flankoj de la sama medalo. La Geneza Kaino estas la homo, kiu klopodas esti nevundebla sen sia frato. Kaj la sekvojn ni tro bone konas!

Oni miaopinie povus argumenti kaj defendi, ke la ekzistorajto de la eklezio ne estas laste por kanti laŭdon al Dio kaj prediki pri la vortoj de Predikanto. Unualoke kontraŭ ĉiuj perfortaĵoj, kiuj tiranas niajn tagojn.

Jacques TUINDER

Vivo de kompatemo estas vivo moviĝanta malsupren! En kunvivado, kie normas moviĝo supren, oni ne nur malkonsilas la moviĝon malsupren, sed opinias ĝin eĉ neprudenta, nesana aŭ simple stulta.

Kiu ja libervole opcias malbone pagatan postenon, kiam oni samtempe ofertas alte salajratan? Kiu opcias mizeron, kiam riĉeco estas atingebla? Kiu opcias kaŝitecon, kiam ankaŭ prezentiĝas trono unuaranga? Kiu opcias resti ĉe unu homo, troviĝanta en granda bezono, kiam en tiu sama horo oni povus helpi al tiom da aliaj homoj?

Kiu opcias retiri sin al soleca loko, kiam oni devas plenumi tiom da urĝaj taskoj? Dum mia tuta vivo homoj min ĉirkaŭantaj donadis la plejbonintencan kuraĝigon 'serĉi ĉion pli altan'. La plej ofte uzata argumento ĉiam tekstis: „Ĝuste tie kaj tiam vi povus fari tiom da bono, por tiom da homoj!"

Sed ĉi tiuj voĉoj, alvokantaj min al moviĝo supreniranta komplete mankas en la evangelio. La vojo de la malsupreniranta moviĝo estas la vojo descendanta de Jesuo. Kion ĝi ofertas? Nu, neniel sukceson, popularecon aŭ potencon, sed la ĝojon kaj pacon de la Diaj infanoj.

Jacques TUINDER
(28.12.2001)

KRISTANISMO

KATOLIKA BONZO

Antaŭ ĉirkaŭ kvardek jaroj, okazis evento en Ŝanhajo, kiu poste disvastiĝis tutlande, la t.n. kontraŭrevolucia grupo, estrita de episkopo GONG Pinmei. Poste miloj kaj miloj da homoj estis pafmortigitaj, arestitaj aŭ enkarcerigitaj, inter ili ne ĉiuj estis katolikoj, estis ankaŭ malbonuloj, fiuloj, friponoj aŭ ŝtelistoj. Grupe en iu koncentrejo, ĉirkaŭita kvarflanke per altaj montoj, sur kiuj troviĝas gardostarantoj. Se iu ajn sonĝis eskapi, ne eblus, ĉar pafmorto atendus tiun. Inter ili troviĝis iu junulaĉo naskiĝinta el katolika familio. Al li mankis familia instruado kaj trejnado, sekvis malbona moro, kompreneble rezulte sur lin tia sorto falis.

Ĉiuj kaptitoj ricevis vizitojn de siaj familianoj, tamen la bonzo ne. Tial oni nomis lin bonzo, kiu ofte predikis kaj evangelizis. Ŝajnis al ili ke la bonzo ŝatis babilemi. Nur la naskito el katolikismo, fijunulo, sciis klare, ke la tiel nomata katolika bonzo, praktike ne estis bonzo, sed katolika pastro. Li ne estis babilemulo, sed ŝatis prediki kaj evangelizi, ekzemple, kio estas malbono, kulpo? Kaj kio estas vero kaj homa vojo? Tiutempe, poste, kelkaj ne lavis la kapon sed baptiĝis, ne sekrete parolis, sed pentofaris.

Ĉiuj en karcero havas porcion da manĝaĵo. La bonzo ofte diris al malmultaj inter ili: vi ĉiuj, junuloj, fortaj kaj viglaj, devas tage kaj vespere pli multe manĝi; mi, maljuna kaj aĝa, ne. Neniu sciis ke li ŝtele manĝis sovaĝajn herbojn. Hazarde, inter ili troviĝis kirurgo, kvankam ne kulpulo, sed kun mankoj kaj eraroj. Laste li akceptis ordonon de superulo: tranĉi la stomakon de la katolika bonzo. Do, klariĝis la tuta vero.

Petro KAIZ
Ningbo, Ĉinio, 2001-10-06

URĜA ALVOKO DE TUTMONDA EKUMENA LIGO PRI LA „EKUMENA"

Ekde 1969, tuj post la apero de itallingva ekumena traduko de la Biblio, la „**Concordata**", oni planis far **Internacia Asocio de Bibliistoj kaj Orientalistoj** (nun **Tutmonda Ekumena Ligo**) novan tradukon de la Biblio en Esperanton je ekumena nivelo, t.e. enhavanta ĉiujn librojn, kredatajn Di-rivelitaj de hebreoj kaj de la kristanoj ĉu antaŭ- ĉu post-kalcedonaj, kiel armenoj, koptoj, abisenoj kaj aliaj ekzistantaj en Azio, aŭ ortodoksaj, katolikoj kaj protestantoj. Tiu ĉi Biblio, nomata „la EKUMENA" ampleksas tri grupojn de libroj, t.e. la protokanonaj, la deŭterokanonaj, kaj la apokrifoj, kun enkondukoj kaj piednotoj klarigantaj la malfacilaĵojn de la tekstoj tiel, ke ĉiuj legantoj en la tuta mondo povos facile ilin kompreni.

Pri la projekto, ekde la komenco laboris dekoj da bibliistoj kaj esperantistoj, sub la direkcio komence de Prof. B. BROADRIBB, el Aŭstralio, poste de pastro H. PARUZEL, el Pollando, Prof. D. B. GREGOR, el Britujo (la du lastaj mortintaj antaŭ 1990), kaj de Prof. A. DURANTI, el Italio, kiu dum 12 jaroj estis ofte malsana, kaj nun vivas sur rulseĝo en maljunulejo.

En tiu ĉi situacio li ĉiutage nur laboras por finpretigi la jam delonge komencitan biblian verkon. Reviziante la amason de bibliaj

TUTMONDA FABELKONKURSO INVITAS INFANOJN VERKI

Paatalo-Instituto estas kultura–literatura edukcentro en Taivalkoski, Norda Finnlando. Ĝi estas nomita laŭ Kalle Paatalo, eminenta verkisto, kiu naskiĝis en Taivalkoski. Inter la agadoj de la Instituto estas fabelkonkurso por finnaj infanoj, kiu okazas ĉiujare ekde 1994.

En 2000 la Instituto eksperimente aldonis al la konkurso Esperantlingvan branĉon laŭ iniciato de la Vilaĝa Asocio de Metsakyla, unu el la vilaĝoj en la komunumo Taivalkoski. Pro bonaj spertoj ĝi estis ripetita en 2001, kiam UEA aŭspiciis ĝin kaj donacis libropremiojn al la gajnintoj. En ambaŭ fojoj finnaj gazetoj multe raportis pri la Esperanta branĉo.

Ankau ĉi jare la konkurso havas Esperanto–branĉon., kiu denove okazas sub aŭspicioj de UEA. Rajtas partopreni infanoj el la tuta mondo, kiuj scipovas aŭ ankoraŭ studas Esperanton.

En la konkurso estas tri kategorioj: A: infanoj ĝis 9-jaraj; B: 10-11-jaraj; C: 12-14 jaraj. La konkursaĵoj povas esti verkitaj de individuwaj infanoj aŭ de grupoj (ekz. lernejaj klasoj). Individuaj kaj grupaj konkursaĵoj estos taksitaj aparte. La longeco de la konkursaĵoj ne estas fiksita. La ĵurio aprezas la fabelecon kaj originalecon de la verkaĵo. En la skribado aŭ tajpado plenkreskulo rajtas helpi laŭ sia konscienco.

La ĉefa celo de la konkurso estas, ke geknaboj interesiĝu pri la uzado de la lernita lingvo, daŭrigu sian bonan hobion kaj ekzercu sian kreivon.

La konkursaĵoj devos atingi la organizanton plej laste la 20-an de septembro 2002. Oni adresu ilin al:

Paatalo-Instituto
PL 39
FI–93401 Taivalkoski
Finnlando

Oni skribu sur la koverto la vorton «Fabelkonkurso». Oni uzu pseŭdonimon kaj menciu, ĉu la konkursanto estas grupo aŭ unuopulo. La nomo, adreso, naskiĝdato kaj (se eble) telefonnumero aŭ retadreso de la konkursanto estu en aparta koverto.

Pli da informoj oni povas ricevi de la komisiito de la Instituto pri la konkurso:

Aini Vaaraniemi
Vaarajarventie 26 A
FI–93590 Vanhala
Finnlando
(rete: aini.vaaraniemi@pp.inet.fi)

La hejmpaĝo de la Instituto estas: www.taivalkoski.fi/paatalo-instituutti
Ĝia direktoro estas Osmo Buller.

➲

skribaĵoj, li trovis, ke mankas kelkaj libroj, ĉefe de la unua kaj tria kanonoj, precipe pro morto de la tradukantoj, konsidere la longan tempon de iliaj komisioj.

Estas pro tio ke li apelacias al ĉiuj esperantistoj kiuj povas: ke ili helpu lin en la tradukado de unu aŭ alia mankanta biblia libro.

Oni skribu por taŭgaj akordoj rekte al la adreso: **Tutmonda Ekumena Ligo (TEL)**, poŝtkesto 177, IT-100 Ravenna, aŭ Prof. Angelo Duranti, IT-48010 Madonna degli Angeli RA,
Tel. 0544-918568.

La redaktoro de la „EKUMENA",
Prof. Angelo Duranti

Profesiiĝu pri esperantologio studante ĉe UAM!

Nuntempe, kiam Eŭropo unuiĝas kaj tutmondiĝo forigas barojn inter nacioj, la lingva problemo ankoraŭ akre manifestiĝas. La esperantistaro proponas sian kontribuon al la solvo: sendiskriminacian dialogon inter kulturoj. Por fariĝi serioza partnero, necesas havi profesiulojn, kiuj havas kapablojn, sciojn kaj diplomon por entrepreni la taskojn de instruistoj, tradukistoj aŭ interpretistoj. Ĉu ni rajtas postuli samajn rajtojn en lernejoj aŭ en internaciaj organizaĵoj sen havi similajn bazojn? Malfacile! UEA emfazas profesiiĝon kaj sekve la rolon de instruado en sia Strategia Plano kaj universitata instruado iĝis elstarigita celo de ILEI.

La Universitato de Adam Mickiewicz (UAM) en Poznań, la dua plej granda universitato en Pollando ofertas 3–jaran eksteran postdiploman studadon pri interlingvistiko. La internacia kurso okazas en la Lingvistika Instituto, sub la gvido de d–rino Ilona Koutny, membro de la Akademio de Esperanto. Inter la prelegantoj estas elstaraj esperantologoj, kiel profesoroj John Wells, Humphrey Tonkin kaj Michel Duc Goninaz; doktoroj Vera Barandovska–Frank, Detlev Blanke, Zbigniew Galor, Katalin Kováts (Smideliusz) kaj Blazio Vaha; la poetino Lidia Ligęza kaj István Ertl.

La Interlingvistikaj Studoj donas superrigardon pri ĝenerala kaj aplikata lingvistiko, fokusiĝas al internacia kaj interkultura komunikado, traktas planlingvojn kaj detale okupiĝas pri gramatiko, literaturo, kulturo kaj historio de esperanto. En la tria jaro eblas specialiĝi pri komunikado, lingvistiko, literaturo, planlingvistiko aŭ pri lingvopedagogio. Pro la metodika formado la Studoj ricevos specialan rolon en la instruista trejnado dum la sekva periodo.

Surloka kurso (unusemajna sesio) okazos unufoje dum la semestro (fine de septembro kaj komence de februaro). La gestudentoj pretigos diplomlaboraĵon kaj post la fina ekzameno ricevos atestilon pri Interlingvistikaj Studoj. La unuaj gestudentoj (el Ĉeĥio, Germanio, Makedonio, Usono kaj Pollando) diplomiĝos ĉi–jare.

Partoprenontoj povas aliĝi el la tuta mondo por la studjaro 2002/2003 ĝis la 15-a de aŭgusto 2002. Pli frua anonco estas bonvena.

Postuloj: fino de mezgrada lernejo (kun abiturienta ekzameno aŭ egalvalora) kaj bona scio de esperanto. Partoprenontoj devas plenumi orientigan teston antaŭ la komenco de la Studoj. Kelkaj stipendioj estas antaŭvidataj.

Kotizo por unu semestro: 400 EUR (por nepagipovaj landoj ĉirkaŭe 120 EUR).

Por pluaj informoj kaj aliĝilo kontaktu d–rinon Ilona Koutny:

Lingvistika Instituto de UAM
ul. Międzychodzka 3-5.
PL 60-371 Poznań
Tel: +48-61 829-27-09
Fakso: +48-61 829-27-00 (sekretariejo)
e-poŝto: ikoutny@amu.edu.pl

➲

Ĉio estas donacita!

La 10an de novembro estis historia, vere memorinda tago en mia loĝloko Heemskerk. Historia, ĉar 2001 estas la Eŭropa Jaro de la Lingvoj. Memorinda, ĉar temas pri simbolkaraktera iniciato de esperantistoj. En la strato, portanta la nomon de D-ro L.L. ZAMENHOF, kolektiĝis homoj kiuj jam parolas 'la bonan lingvon', kaj aliaj kiuj eble intencas ĝin iam lerni. Ni ĉeestis tie por planti arbon. Tre plaĉis al ni prunuso, vere multinfana fruktarba familio, al kiu apartenas abrikotoj, ĉerizoj, migdaloj, mirabeloj, persikoj, prunoj kaj pruneloj. 'Nia' arbo nepre havas nomon specialan, eĉ idee profundan, faklatine „Prunus Pandora".

Pandora nomiĝis la de diino Atena talente dotita virino, kiun Hefesto, dio de fajro kaj metalforĝado, faris el tero kaj akvo. Ŝi ne nur estis gracia kaj ĉarma, sed vere posedis ĉiujn kvalitojn: saĝeco, elokventeco, lerteco, artamo, ktp. Ŝi edziniĝis kun Epimeteo malgraŭ la avertoj de Prometeo, kiu ŝtelis la fajron de Zeŭso. Konsekvence li sendis Pandoran al la tero por puni la homojn per plagoj, turmentoj kaj katastrofoj skatole pakitaj. Tamen, ŝi nepre ne enrigardu la skatolon. Nu, Pandora tre scivolis, sekve malobeis la ordonon kaj malfermis ĝin. Tuj disvastiĝis multe da mizero sur la tero. Kaj ni komprenas, ke unu el la plej grandaj mizeroj estas la diverseco de lingvoj. Sed bonŝance enrestis en la skatolo: la Espero. Certe ankaŭ la Lingvo de Espero, kiun multaj scias kaj spertas la plej efika solvo de la lingvoproblemo.

La etimologio de la nomo Pandora (1) estas simpla: ĝi proksimume signifas: 'Ĉio estas donaco aŭ al mi donita', ĉar *pan* = ĉio (2), kaj *dôreia* (aŭ *dôron*) = dono, donaco, premio, manplato. Serĉante tiujn lastajn du vortojn en Greka-Latina leksikono oni trovas la riĉan vorton ***munus***, kiu havas abundon da signifoj (3), el kiuj mi elprenas don' kaj task'.

Por ni, esperantistoj, tiu vorto ***munus*** estas interesa, ĉar kune kun *ko* (= kun, kune) ĝi formas la vortojn komuna, komuniki, komunio, komunumo, ktp. Jes, ni estas privilegiitaj, ke ni havas komunan lingvon, komunikilon per kiu ni senprobleme povas mondvaste komunikiĝi kun alilingvanoj. Tiun lingvon ni dankas al D-ro ZAMENHOF. En *kon-takto* (4) kun kun-homoj ni povus sperti ke homoj estas donitaj al ni kaj ni al ili. Reciproke ni kvazaŭe rolas kiel taskoj kaj donoj! Tion 'denaske' signifas ko-mun-ik-iĝi: homoj estas inter si donitaj, devige kaj donace. Zamenhof donace for-donis sin al ni, kreinte la internacian lingvon, kiun ni uzadas ĝis la hodiaŭa tago. Kiom trezora donaco! Jam kiel kvinjara knabo li intuicie komprenis, kia mizero prezentiĝas per tio ke homoj estas inter si dividitaj lingve kaj religie. Parenteze nepre pripensu, kiom esprimpova kaj trafa estas lia nomo (5)...

La esperantistoj de Heemskerk plantis arbon, idon de arbo kiu antaŭ nelonge estis semo kaj poste mem zorgos pri nova semo. Ili esperas, ke tiu arbo donos daŭrajn kaj dolĉajn fruktojn, karakterizajn por prunuso. La nomo Pandora instruu al ni, ke la solvo de la problemo de malriĉo en la mondo enestas en la formulo „ĉio estas donita al mi, por ke mi fariĝu homo taske komunikema". La vorto komuniki en nia gepatra lingvo estas tre signifa kaj ŝlosila: mede-delen, kune dividi. Jes, kiam ni, reprezentantoj de la plej kapitala parto de la mondo, decidus dividi kaj fluigi ĉion troan (6) kio estas en nia manplato, kiom feliĉus kaj prosperus la mondo! Ni ekus vivi pere de la espero, kiu postrestis en la Pandora skatolo. Kial la 'diligenta kolegaro' ne restu fidelaj gardantoj de longa, daŭriginda tradicio!

Jacques TUINDER

(1) Hesiodo poeme pri ŝi verkis jene, eĉ dufoje uzis la radikon donac': „*hoti pantes olumpia dômat' eĥontes* ***dôron edôrêsan***."

(2) Pan retroviĝas en vortoj kiel pandemonio, pankreato, panoramo, panteono, pantomimo, k.a.

(3) I.a. ago, amo, ĉarmo, deĵoro, destino, don(ac)o, faro, favoro, graco, gracio, laboro, ludo, ofero, ofico, posteno, servo, tasko.

(4) = Alia homo estas tiom kuna, tiom apuda kaj proksima, ke mi povas lin tuŝi.

(5) Zamen (= Samen, semo) kaj hof (hoffen, esperi).

(6) Bonvolu permesi al mi lastan, cetere tre konatan, grekaĵon en La Jaro de Lingvoj: *panta rhei, outhen menei*, t.e. ĉio fluas — nenio restas!

La septembra sesio (23-27.09.2002) estas kunligita kun la semajnfina kultura renkontiĝo ARKONES, same en Poznano, kiu post la intensa tutsemajna serioza laboro ebligas malstreĉiĝon (kun teatraĵoj, muziko, diskutoj, ktp).

Se la studontoj bezonas lingvan perfektigon, ni pretas aranĝi superanivelan intensan lingvokurson (unusemajnan) antaŭ la septembra sesio kontraŭ kroma kotizo.

LABORPLANO DE LA PROJEKTO «ĜEMELAJ URBOJ»

Estimataj,

Kiel vi eble scias la interurba ĝemeliĝo estas interesa paŝo al internaciiĝo, kiu helpas al civitanoj renkontiĝi kun kaj informiĝi pri alilandaj kulturoj.

Pluraj esperantistoj de jaroj aktivas diversmaniere en tiu ĉi kampo, kun alternaj ŝancoj.

Fine de 1999 LEA (Liaoning-provinca Esperanto, Ĉinio) prezentis al esperantistoj la projekton «Ĝemelaj Urboj» kaj pozitive reagis unuopuloj kaj esperantoasocioj el pli ol 50 landoj.

Antaŭ unu monato la estraro de UEA nomumis min komisiito pri la projekto «Ĝemelaj Urboj», por kunordigi kaj antaŭenpuŝi la tiukampajn klopodojn.

Pro tio mi nun prezentas al vi la skizan laborplanon kaj invitas vin ĉiuj al kunlaboro aktiva, sendante al mi la informojn necesajn por ĝia realigo.

Mi estus tre danka se vi ankaŭ disvastigas plej vaste tiun ĉi cirkuleron por atingi kiel eble plej multe da samideanoj.

Kunlaborpreta, plej amike salutas.

Universala Esperanto-Asocio
Projekto «Ĝemelaj Urboj»
Komisiito Wu Guojiang
Fushun Shiyouyichang Yanjiusuo
113008 Fushun Liaoning Ĉinio
Ret-adreso: amikeco999@21cn.com

LABORPLANO

1. Klopodi kontakt(ig)i esperantistojn loĝantajn en jam ĝemelaj urboj, por ke ili kune proponu kunlaboron al la lokaj

LIRO-2001

Je la Tago de ZAMENHOF estis anoncita la rezulto de la tradicia belarta konkurso Liro-2001, kunorganizita de Urala Esperantista Societo kaj „La Ondo de Esperanto".

La kvinpersona juĝkomisiono (Aleksej BIRJULIN, Wolfgang KIRSCHSTEIN, Aleksander KORĴENKOV, Alen KRIS, Valentin MELNIKOV) ricevis 41 konkursaĵojn de 19 personoj el 10 landoj — Ĉeĥio, Francio, Hungario, Italio, Jugoslavio, Kroatio, Ruslando, Svedio, Ukrainio, Usono.

La rezulto de Liro-2001

ORIGINALA POEZIO.

Laŭreato: Nicolino ROSSI (Italio) pro „Kien la homo?"

➲

instancoj cele al intensigo de la ĝemelaj interŝanĝoj.

2. Verki konsilaron pri kiel kontakti la urbajn aŭtoritatojn, proponante servojn de la esperantistoj en starigo aŭ/kaj plibonigo de interurbaj ĝemelaj rilatoj.

3. Instigi esperantistojn iniciati ĝemelajn rilatojn en propra urbo.

4. Klopodi establi kontaktojn kun institucioj — naciaj kaj internaciaj — kiuj agas en tiu kampo, por interŝanĝo de informoj kaj proponante kunlaboron.

Por tion realigi:

5. Alvoki esperantistojn kiuj loĝas en ĝemeligitaj urboj, komuniki al la komisiito la koncernajn urbonomojn kaj ĉu ili jam establis kontaktojn kun la esperantistoj de tiuj urboj.

6. Komuniki al la esperantistoj la adresojn de la esperantistoj loĝantaj en la ĝemelurboj por establi kontaktojn.

Laŭdaj mencioj:

Aleksandr ULJANOV (Ruslando) pro „Ĝis la!";

Lucija BORĈIĆ (Kroatio) pro „Por la orfoj kaj plorantoj";

Julius BALBIN (Usono) pro „Boule-de-Suif".

ORIGINALA PROZO. La konkurso ne okazis, ĉar konkursas nur unu persono.

TRADUKA POEZIO EL LA RUSA (Nikolaj GUMILJOV: „Ŝestoje ĉuvstvo").

Laŭreato: Nikolao GUDSKOV (Ruslando).

Laŭdaj mencioj:

Aleksandr ULJANOV (Ruslando);

Tatjana AUDERSKAJA (Ukrainio).

TRADUKA PROZO EL LA RUSA (Pavel BAĴOV: „Serebrjanoje kopytce").

Laŭreato: Aleksandr ULJANOV (Ruslando).

Laŭdaj mencioj:

Tatjana VŜIVCEVA (Ruslando);

Tradukista grupo de societo „ESPERO" gvidata de Meri ABOLSKAJA (Ruslando).

TRADUKA PROZO EL LA ANGLA (O HENRY: „The Cop and the Anthem").

Laŭreato: Sten JOHANSSON (Svedio).

RECENZO („Rusaj amnoveloj").

Laŭda mencio: Klara ILUTOVIĈ (Ruslando).

Ĉiu laŭreato ricevos diplomon kaj valoran librodonacon. Konforme al la regularo de Liro, la organizantoj rezervas al si la rajton ĝis la 31-a de decembro 2003 publikigi la ricevitajn konkursaĵojn en „La Ondo de Esperanto" aŭ en aparta eldonaĵo, kondiĉe ke ili avertos pri tio la aŭtoron ĝis la 1-a de februaro 2002.

Gratulon al la laŭreatoj!

Dankon al ĉiuj partoprenintoj!

Halina GORECKA
sekretario de Liro-2001

AKTUALAĴOJ

Mia animo kredas je io, kion devas nei mia intelekto!

Jen vortoj de la Hungara aŭtoro KERTÉSZ Imre, kiu poste en intervjuo diris, ke tiu elparolo resumas lian vivon. Kiam mi legis kaj pripensis tiujn vortojn, mi demandis al mi: „Kiel vi, Jacques, povus resumi vian vivon? Kio kaj kia estas via kredo?"

La 8an de majo Vera kaj mi, en akompano de estrarano Cor DEKKER, profesia konstru-inspektisto, kun edzino Henny, flugis al Srilanko, kun kiu lando mi havas intensivan kontakton jam longan. Tiun belegan landon preskaŭ du jardekojn skurĝas intercivitana milito, kvankam nune duonsilentas armiloj, dum la Norvega registaro fortostreĉe klopodas interproksimigi Singalojn kaj Tamilojn. Nia intenco estis viziti ankaŭ du projektojn en la Jaffna regiono, sed nek doganaj nek lokaj aŭtoritatuloj permesis al ni eniron kaj resendis nin rezolute. Ni povis transdoni ĉe la limo kofron plenan de lerniloj kaj donacoj por la infanoj de *'Vaazhvaham'* (= Vojo de Vivo), hejmo por vidhandikapitaj geknaboj en Chunnakam. Ni do ankaŭ ne sukcesis konatiĝi kun la afabla optikisto Eric GANESH, kiu helpis al tiom da homoj per okulvitroj. Ni volis lin ĝojigi per kompleta skatolo enhavanta skeletmuntumon kaj lensojn multdioptriajn por okulmezurado. Nu, li poste ricevos komprenonte nian fortan deziron premi al li la manon! Por mi estis granda seniluziiĝo, ĉar mi ege deziris persone renkonti s-inon B. SIRI BHASKARAN, ĉefinon de la Kampara Evoluiga Societo en Mallakam, kaj s-inon A. SINNATHAMBY, direktorinon de 'Vaazhvaham'. Nu, kion fari? Fakte ankaŭ la Nederlanda ambasadoro en Colombo emfaze malkonsilis al ni eniri tiun regionon tensioplenan kaj ne riski nian vivon.

Dum nia restado ni konatiĝis kun la Ligo de Vidhandikapuloj kaj konstatis, ke oni havas la eblon brajlopresi librojn en la singala kaj angla lingvoj, sed ne en tamila. Ankaŭ la voĉlegata libro estas konata. Ni povis konatiĝi kun modesta biblioteko, sed en tamila lingvo nek libroj nek sonkasedoj estas haveblaj. Ni havis la okazon viziti la blindulejon en Colombo (210 infanoj) kaj la instituton en Anuradhapura (100 infanoj parte blindaj, parte surdaj). En tiu hejmo encerbiĝis al mi penso de Helen KELLER, kiu iam skribis: *„Mi ĉiam opiniis, ke estus beno, se ĉiuj homoj en la komenco de sia adulta vivo povus esti blindaj kaj surdaj nur kelke da tagoj. Pro la mallumo ili aprezus sian vidpovon, kaj la silento instruus al ili la ĝojojn de sono kaj muziko".* Ho, kiom lerte kaj diligente la surdaj knabinoj kaj knaboj, ade vivantaj en silenta mondo, enkondukis nin en la lingvon de gestoj. Kiom ni komune ridis! Nur pro nia restado kelktempa ni donis al ili iom da lumo kaj plezuro! Laŭ nederlanda social-helpistino, deĵoranta en tiu instituto, vidhandikapitaj infanoj pli profitas de instruado ol siaj aŭdo-difektitaj samsortanoj. Ni sponsoris bonan manĝon por tiuj kompatindaj infanoj, por kiuj la ŝtato pagas ĉiutage nur dek rupiojn (= la prezo de du bananoj)... La salajroj de la deĵorantoj en hejmoj kaj institutoj estas multe subminimumaj. Ĉie mankas rimedoj, nelaste helpiloj. Ankaŭ la Rekapabligan Centron

por handikapuloj en la Srilanka ĉefurbo ni vizitis. Tie ni renkontis afablan junulon, kiu antaŭ kvin jaroj (li profesie estas ĉarpentisto) falis de tria etaĝo teron kaj nun vivolonge estas duonlama. Mi promesis al li fari mian plejeblon helpi al li per adaptita rulseĝo, por ke li post energia lernado de elektro-teknika fako povu atingi laborlokon.

Absoluta kulmino de nia restado estis la oficiala malfermo de *'Dharisanam'* en Batticaloa, tute nova kaj nepre belstile konstruita lernejo kun tranoktejo havanta multinfanan kapaciton. Kortuŝan feston ofertis al ni tridek kvin blindaj geknaboj kun danco, muziko kaj ĉiaj prezentaĵoj. Ili ĉirkaŭkole ornamis la teamanojn per multkoloraj florkronoj. Parolis reverindaj kaj lokaj/regionaj aŭtoritatuloj, lernejestraranoj kaj la afabla blinda direktoro. Ankaŭ mi mem festparoladis kaj menciis vivon kaj verkon de d-ro L.L. ZAMENHOF, tirante paralelojn inter la loko, kie li naskiĝis kaj kiu inspiris / instigis lin krei lingvon-kun-interna-ideo, kaj la lando, kiun jam tiom longe disŝiras terura milito interetna. Ankaŭ ĉi tie diversas gentoj, lingvoj kaj religioj!

Imponaj estis la matenaj horoj, dum kiuj hindua kaj katolika pastroj per propraj simbolriĉaj ritualoj benis la ejojn de la preskaŭ finkonstruita instituto. Ho, por ĉiu el ni fariĝis tago neforgesebla, nelaste ĉar ripetfoje la infanoj sciigis al ni, kiom ili ĝojas kaj feliĉas!

Aparte oni honoris nian optikiston Eli HOSSEVOORT, kiu jam por la kvara fojo venis por servi al centoj kaj centoj da homoj per okulvitroj. Ankaŭ nune diligente asistis lia filino Roeki, kiu havas varman rilaton kun la studentoj de 'Dharisanam'.

LUMO AŬ MALLUMO

Mallumo ne povas forpeli mallumon;
nur lumo havas tiun kapablon.

Malamo ne povas forpeli malamon;
nur amo havas tiun kapablon.

Malamo kreskigas malamon;
perforto kreskigan perforton,
kaj fieco kreskigas fiecon
en spiralo subeniranta
kaj neniiganta.

La ĉenreakcion de malbono
- malamo naskanta malamon
militoj kaŭzadantaj
novajn militojn -
vere necesas rompi.

Ĉar la alternativo:
nin ĵeti en la mallumon
de pereo kaj ruiniĝo.

Martin Luther KING (1929-1968)
tradukis : Jacques TUINDER

Ni, esperantistoj, povus bonege servi al la tamilaj blindulejoj en Batticaloa kaj Chunnakam per brajlopresejo, por ke la instruistoj ne plu bezonu mane pretigi lernolibrojn. Helpoprononojn mi volonte akceptas!

Kun granda danko, ĉefe al s-ro KAMALADHAS, sekretario de *'Dharisanam'*, kaj al ade helpema ŝoforo Rudra, kaj varmaj salutoj,

Jacques TUINDER
prezidanto de Fondaĵo "E-vid-e-nt-e"

Esperantistoj konstruas lernejon en Togolando!

Estas tre malfacile trovi esperantiston, kiu ne konas la nomon de Hans BAKKER. Kaj sendube en Afriko tio des pli veras. La nigra kontinento estas la grundo, kie la Amsterdarmano, apartenanta al la 'diligenta kolegaro' jam dum jardekoj 'semas kaj semas konstante' por naski novajn esperantistojn. Kaj post longa periodo de semado sekvas fruktodona tempo de rikoltado.

Kiam la nun 43-jaraĝa Koffi GBEGLO, estrarano de UEA, antaŭ dudek jaroj eklernis la internacian lingvon, li eble revis iam fariĝi verkisto kaj instruisto. Nu, tiuj revoj dume realiĝis. Sed nepre li ne povis imagi al si, ke lia nederlanda amiko Hans jam strecos siajn fortojn por helpi al li konstrui lernejon...

La pasintan jaron en Nederlando naskiĝis la fondaĵo „Lernejo por Togolando", kies nura celo estas forigi la primitivan ejon en kiu Koffi kaj liaj kolegoj donas lecionojn al centoj da infanoj en la Lome'a kvartalo *Anfame* kaj aperigi veran konstruaĵon, taŭgan por instruado al infanoj kaj plenkreskuloj.

Meze de januaro Koffi troviĝis en Nederlando por ĉeesti kunvenon en la Centra Oficejo de UEA. Kaj tiun ĉeeston li utiligis por renkonti vastan rondon de esperantistoj kaj aliaj helpantoj. Li konatiĝis kun modernaj lernejoj kaj instrusistemoj, vizitis butikon en kiu oni vendas produktojn de ekonomie malfortaj landoj kaj ekologian-bonfaran revendejon, parolis antaŭ radio kaj ĉeestis gazetarkonferencojn por paroli pri sia idealo estonte lecioni en bone ekipita lernejo.

En Heemskerk li havis renkontiĝon kun komunuma laborgrupo, en kiu partoprenas pluraj organizaĵoj kiuj aktivas por paco, evoluo, medio, tria mondo, k.s. Ankaŭ mia liliputa organizaĵo, Fondaĵo „E-VID-E-NT-E", apartenas al ili. Kaj tiu organizaĵo estas tiom bonŝanca, ke

De maldekstre dekstren: Ben YPMA (fervora komunuma reprezentanto) la nura neesperantisto ĉeestanta?), Jacques TUINDER (estrarano de la „Lernejo por Togolando"), Joke HOOBROECKX (estrarano de Esperanto-Nederlando), Marianne VAN GEMERT (Mediprotekta Grupo „BONKARAKTERO"), Koffi GBEGLO, Hans BAKKER (iniciatinto) kaj Ton VERWOERD (Mondvasta Edukado pere de Esperanto).

ĝi jam sepfoje ricevis financan subtenon flanke de nia komunumo por projektoj favore al homoj kun vidhandikapo. La reprezentanto de la komunumo, Ben YPMA, malkaŝis ke la projekto de Koffi, se

plenumiĝos diversaj kondiĉoj povos kalkuli pri subvencio de ĉirkau 4800 EURoj dum ĉi tiu jaro. Ĉiuj partneroj de la Komunuma Laborgrupo promesis de el la propraj ebloj forte kontribui al la realigo de la valora kaj esperiga projekto.



Tia ĝis nun aspektas la lernejo en kiu instruas Koffi Gbeglo en Lomé!

La nuna 'lernejo', kiun vi povas admiri sur la bildo, estas ne pli ol barako konstruita el kano kai matoj. Ĉi tie instruistoj malalte salajrataj kaj infanoj malriĉaj ĉiutage renkontiĝas ĉe temperaturo kiu ofte superas kvardek gradojn. La geknaboj devas fari longajn marŝojn por atingi la lernejon kaj ili ĝenerale manĝas nur unufoje en la tago. La ekonomio de la lando estas ploriga; ok el dek gejunuloj ne povas trovi laboron.

Kun ĝojo mi povas skribi, ke la konstruado jam komenciĝis. Unualoke oni pretigos triklasan konstruaĵon kun la intenco, se la monujo tion permesos ĉiujare alkonstrui pluan klasĉambron.

Jacques TUINDER
Heemskerk, 19/01/2002

MOVADO

Raporto kaj impresoj de la 15a Ekumena Kongreso kaj 5a JET, 14–21 julio 2001 en Zagreb

La temo estis ***Adoru, la nova preĝ- kaj kant-libro de IKUE kaj KELI.***

Ni kongresis en la porsacerdota seminario, sufiĉe urbocentra loko. La aliĝlisto enhavas 209 nomojn. El ili estis 48 gejunuloj, ĝojige!

Sabate post la vespermanĝo je la 19a horo ni havis interkonan vesperon. Unu el la eroj en la programo estis prezentado de la respektivaj estraroj al la partoprenantoj.

Dimanĉe Jacques TUINDER, gvidis ekumenan Diservon en la plej granda preĝejo de la kongresejo. Adolf BURKHARDT bone predikis pri Jesaja 55 kaj pri la virino ĉe la puto de Siĥar.

Posttagmeze okazis la solena inaŭguro en la granda salono.

Vespere kantis belege por ni la Zagreba grek-katolika CIRIL-METODA KORUSO. Sub gvidado de Goran BLAŽEKOVIĆ 14 viroj en ĝispiedaj nigraj vestaĵoj kantis. La ĥoro estis fondita en la jaro 1931. Interesa kaj mirinda travivaĵo.

Lunde, antaŭtagmeze prelegis Philippe COUSSON pri kalvinismo kaj ĝiaj

La grek-katolika ĥoro en Zagreb. (fotis PC)

Albrecht KRONENBERGER kaj Bernhardt EICHKORN gvidas la ĉantadon laŭ Adoru *en la Zagreba kapelo. (fotis PC)*

Diservoj. Povus esti sen kaj kun Sankta Manĝo, sen kaj kun liturgio. Ambaŭ variantoj estas veraj Diservoj, sed Diservon sen prediko oni ne konsideras kiel vera Diservo. Sekve la prediko havas gravan rolon, la plej gravan? Li ankaŭ priskribis la Sanktan Manĝon ĉe ili. Estas vera pano en pecoj. Oni trinkas la vinon el la sama pokalo de mano al mano. Kelkfoje oni uzas individuajn kaliketojn.

Poste Siegfried KRÜGER prelegis pri malnova preĝejo en lia hejmurbo Heilbronn kun ĝia turo en formo de oktogono. Tiu formo gvidis lin daŭrigi kun parabolo pri la diversaj ciferoj kaj nombroj, kaj iliaj signifoj. Li zorge studis la diversajn signifojn, sed ne povis rakonti pri ĉio. Nur ke la plej sanktaj nombroj estas 3, 7 kaj 8. Ekzemple, la sankta Triunuo, la sepbranĉa kandelabro kaj la ofte okangulaj baptujoj.

Posttagmeze prelegis Ulrich MATTHIAS pri lia libro: *Esperanto, la nova latino.*

Vespere ni ĝuis bonajn prezentadojn de niaj junulinoj el Pollando kaj Ĉeĥio. Ili dancis, prezentis skeĉojn kaj dramojn bonege. Dankon al ili kaj al la gvidantinoj.

Marde, la unua prelego por la tago temis pri Rose AUSLÄNDER prezentita de la geedzoj RÖSSLER.

Poste rakontis Albrecht KRONENBERGER pri siaj teknikaj suferoj dum la longa laboro pri *Adoru*. Ekzemple la slavaj signoj faris al multan laboron, eĉ permane. La komputilo ne „ŝatis" ilin. Du tagojn antaŭ la liverado al la presejo ĝi estis preta. Albrecht tamen diris ke la laboro estis agrabla.

Adolf BURKHARDT aldonis rakontojn pri la elekto de la kantoj. Kion elekti? Ĉu origine esperantajn, ĉu alilingvajn? Krome Adolf devas kontrakti la aŭtorojn de la melodioj, la eldonejojn, ktp. Koran dankon al niaj laboremaj kaj lertaj fratoj kiuj venkis ĉiujn obstaklojn.

Vespere okazis orgenkoncerto en la „baziliko de la koro de Kristo" en la urbocentro. Nia „propra" orgenisto



Gekongresanoj dancas, pardonu!, ekzercas sian korpon laŭ muziko. (fotis PC)

KMD Ernst Leuze el Germanio regalis nin per bela koncerto kun muziko de Bach, Brahms, kaj aliaj. Vere ĝuinda koncerto en bela preĝejo. Dankon!

Merkrede, la ekskursa tago. La ĉefa celloko estis Maria Bistrica, la plej sankta loko por la Kroatoj. Ĉirkaŭ 32 km norde de Zagreb. Proksimume 500 000 pilgrimantoj vizitis ĉi tiun lokon ĉijare. La papo Johano Paŭlo II estis inter ili en 1998. Ĝi komenciĝis en 1684. La preĝejo S-taj Petro kaj Paŭlo estas la centro de la urbeto. En la ĉefa altaro situas la statuo de *Nia Dipatrino de Bistrica, la reĝino de la Kroatoj.* La pilgrimantoj kredas je la miraklaj fortoj de la statuo. Tute proksime de la preĝejo oni aranĝis belan *Via dolorosa*. Tie oni povas viziti la staciojn, kaj preĝi kaj danki. La ĉirkaŭaĵo, la regiono Zagorje, estas tre bela kun verdaj montetoj kaj valoj. Ni daŭrigis al la interesa vilaĝo Gornja Stubica. Oni regalis nin per pano, salo kaj forta trinkaĵo de la regiono. Kvar virinoj en belaj regionaj kostumoj kantis lokajn kantojn por ni. Ĉarma travivaĵo! Post tio, ni vizitis la kasteleton Stubicki Golubovac, meze de arbaro. Ĝi enhavas etan muzeon kaj belajn ĉambrojn. Tie oni aranĝas i.a. koncertojn. Du el nia grupo kaptis la okazon ludi sur la koncerta piano kaj la Rumanino Doina Eremia kantis bele. Fina haltejo estis la banloko Kupaliste Stubaki. Banemuloj kaj aliaj trinkis kafon, ktp. Ni revenis al la kongresejo plenaj de impresoj kaj kontentaj pri tre bona ekskurso.

Ĵaŭde antaŭtagmeze ni havis niajn Ĝeneralajn Kunsidojn. Por ni, KELI-anoj do, la jarkunveno. Kelkajn gravajn punktojn mi volas mencii. La tuta protokolo aperos en *Dia Regno*. La sekretarian jarraporton ni danke akceptis, kaj same



La estraro de KELI dum la jarkunveno en Zagreb (de mald. Irén Bagi, Adolf Burkhardt, Jacques Tuinder, Britta Rehm, Siegfried Krüger, Philippe Cousson, Pavel Polnicky). (fotis PC)

la kasistan raporton. Ni decidis konfirmi la altigon de la jara kotizo de 15 al 20 EURoj ekde 2002. Ma Young Tae ne rekandidatis. Feliĉe la juna Hungaro Somhegyi Zoltan (nepo de Éva Farkas) deklaris sin preta eniri la estraron. Kongresaj planoj: 2002 ni denove havos KELI-kongreson en Hungario, en la banloko Berekfürdő, proksime de Debrecen. Por 2003 ni ankoraŭ ne decidis.

Posttagmeze prelegis Gerrit Berveling pri la kanonaj libroj. Post tio parolis Stanisław Mandrak el Gliwice pri lia vojaĝo al Pekino ĉijare (2001). Interesaj lumbildoj akompanis la rakonton.

Vespere okazis ekumena Diservo kun paralela Sankta Manĝo.

Vendrede antaŭtagmeze gastprelegis Doktoro Sure Zecevic el Vieno. Lia unua temo estis la religia vivo en Kroatio, kaj li aldonis multe da statistikoj koncerne la temon. Li rakontis pri diversaj kristanaj eklezioj kaj sektoj, sed ankaŭ pri la vivo en la judaj sinagogoj, ktp. Ili havis grandajn malfacilaĵojn dum la bataloj inter etnaj grupoj. En la lernejoj oni klopodas pligrandigi la komprenon inter la etnoj. La ekstremuloj ne devos venki denove, li diris.

La dua temo estis pri la pilgrimado al la Maria-pilgrimejoj. Li traktis la Maria-kulton el pluraj vidpunktoj. Ekzistas multaj skoloj ene de katolikismo. Ili pli malpli adoras Marian, aliaj estas centritaj al Kristo. Li akcentis: Maria NE estas Dio, ŝi preĝas por ni kaj kun ni, kaj tion ni sentas. Ekzistas nur unu Savanto. „Mariologio" ne devas dividi nin. Pli bone por ekumenismo estus, ke ŝi ricevus sian justan lokon laŭ la Biblio. Ŝi estas imitinda modelo por ni.

Posttagmeze „la Hungarinoj" prezentis Berekfürdőn, la loko de la KELI-kongreso 2002. Fotoj kaj broŝuroj montris belan taŭgan lokon por ni. Bonvenon!

Julia Sigmond el Rumanio parolis pri la internacia virina preĝtagó, la unuan vendredon de marto ĉiujare. Kune ŝi montris belajn interesajn diapozitivojn pri la landoj: Madagaskaro, Venezuelo kaj Indonezio, kaj pri la virina agado tie. Entute bona prezentado, dankon!

Fine la kutima gaja adiaŭa vespero sub gvidado de nia sprita frato el Romo, Carlo Sarandrea. Varioplena programo kun kantoj, muziko, skeĉoj, kaj pli seriozaj eroj, tre bona miksaĵo. Plej fine dankesprimoj al diversaj gelaboru-

Aplaŭdoj dum la adiaŭa vespero (fotis PC)

loj, plej unue al la estrino de la kongreso, Marija Belošević.

Britta Rehm

Nekrologoj

Paroĥestro Sigurd Bergström

Li naskiĝis la 29an de aprilo 1910 en la norda parto de Svedio. En Härnösand li prenis la studentan ekzamenon. En 1940 li estis ordinita pastro en la diocezo de karlstad. En Karlskoga li iĝis paroĥestro en 1968. Li emeritiĝis en 1975. Li iĝis membro de KELI kaj verŝajne Anna instruis lin.

En sia hejmo li mortis la 25an de junio 2001. La nuna paroĥestro Gunnar Hatt enterigis lin. Li estas karmemore memorata de lia edzino Sara kun infano kaj genepoj. La sveda sekcio de KELI kaj precipe la membroj en Karlskoga bone memoras lin.

Ragnhild Niklasson, Örebro

Ŝi endormiĝis kviete en serva loĝejo la 19an de novembro 2001. Ragnhild

naskiĝis en Knisslinge la 21an de decembro 1908. Post la popola lernejo ŝi studis ĉe Hermods kaj trapasis la komercan studadon. Kiel komerca entreprenantino ŝi deĵoris ĉe advokata firmao kaj je la komerca ĉambro de Örebro. De tie ŝi eksiĝis kun pensio en 1973.

Dum la plej granda parto de sia vivo Ragnhild apartenis al la pentekosta movado. Frue ŝi lernis la internacian lingvon Esperanto de la amiko Erik Carlén. En 1949 Ragnhild iĝis membro de la sveda sekcio de KELI. Kiel kasistino ŝi

deĵoris de 1950 ĝis 1953, kiel sekretariino de 1952 ĝis 1956. Ŝi estis prezidantino de la sekcio inter 1977 kaj 1980. Je la memoro de tiuj kiuj festis 60-90 jarojn kaj je la memoro de la mortintoj estis fondita fonduso. Ragnhild estis kasistino de tiu fonduso.

La Kristana Esperanto Asocio havis printempan kaj aŭtunan konferencon. Dum tiuj, ŝi estis la konferenca mastrino. KELI havis jarkongresojn aŭ kune kun la katolikoj ekumenajn kongresojn. Ragnhild estis membro de la estraro inter 1971 kaj 1976. Dum la jarkunveno 1993 ŝi iĝis honora membro. Ni gratulis ŝin je la 85-jaraĝa datreveno. En la membrofolio ŝi dankis kaj skribis, ke pro malbona vidkapablo ŝi ne plu povis partopreni kunvenojn.

Ragnhild estas karmemore memorata de la filo Morgan kun edzino Jeanna kaj iliaj gefiloj kaj genepoj. La funebra ceremonio okazis en la Adventa preĝejo en Örebro la 4-an de decembro 2001. Ragnhild estis varmkore kristano kaj bonega esperantistino.

Siri SJÖSTEDT

Siri SJÖSTEDT mortis post longa tempo de kancero en la malsanulejo de Stockholm la 14an de junio. Ŝi naskiĝis la 23an de septembro 1915 en Skanör. Post komerca studado en gimnazio en Malmö ŝi estis librotenisto en du firmaoj. De oktobro 1942 ŝi translokiĝis al Stockholm por esti kasistino ĉe Broderskapsrörelsen, kiun postenon ŝi havis ĝis la pensiiĝo.

Siri iĝis membro de Andreaskyrkan de la komenco en oktobro kaj estis aktiva membro kiel kasistino kaj helpis precipe dum la kunvenoj por la gepensiuloj. 1947 ŝi studis esperanton en kurso de Anna ALAMÖ. Siri iĝis dumviva membro de la sveda sekcio de KELI ek de 1948 .

1948 estis la unua kongreso de KELI en Tostarp kaj poste la UEA kongreso en Malmö. Ambaŭ kongresoj Siri partoprenis. De tiu tempo mi konis ŝin. La KELI grupo en Stockholm havis siajn kunvenojn en Valhalla preĝejo kaj en Abrahamsbergskyrkan. Ni poste havis la kunvenojn en hejmo por maljunaj homoj. Kiam ni nur iĝis 15 membroj, ni havis la kunvenojn en la hejmoj de Siri, Åke, Lilli kaj ĉe mi. Ŝi estis la kasistino de nia grupo kaj la revizianto de la sekcio kune kun Lilli aŭ kun mi. Siri partoprenis la kunvenojn de Grupo Esperantista en Stockholm kaj multaj svedaj kongresoj kaj internaciaj KELI aŭ ekumenaj kongresoj. La lasta kongreso estis en Hungario 1996. Ŝi partoprenis nian jarkunvenon en la kafejo de Citykyrkan ĉi-jare.

La funebra diservo okazis en la preĝejo de Skanör la 8an de julio sub gvido de nevino kaj pastro Birgitta SJÖSTEDT. Poste sekvos memora kunveno en Bäckagĺrden. Ŝi estas karmemore funebrata de gefratoj kun familioj, la preĝejo de Andreas kaj la sveda sekcio kune kun la internacia asocio de KELI.

Arne LUNDKVIST

Ruth GULLBERG 1910–2002

Tiu fidela KELI-membrino forlasis nin la 14an de aprilo. Ruth ofte partoprenis niajn enlandajn kaj eksterlandajn kongresojn. Certe multaj geamikoj memoras ŝian afablan, modestan personecon.

Jam en 1934 ŝi kiel 24-jarulino partoprenis UK en Stokholmo. Ŝi eĉ videblas (almenaŭ la kapo) en la foto post la paĝo

64 en «*Nia historio*», meze iom maldekstre de la kapo de Richard HOPPE.

Estis granda sensacio en la malgranda loko Grycksbo kiam ŝi kaj ŝiaj tri fratinoj partoprenis la UK en Varsovio 1937!

Inter 1973 kaj 1976 ŝi estis kasistino de sveda KELI kaj sekve ŝi ankaŭ fariĝis kasistino por la KELI-kongreso en Jönköping 1975.

Cetere ŝi dediĉis sian liberan tempon al la kara Misia preĝeja komunumo; dum multaj jaroj kiel orgenistino, kasistino, gvidantino por gejunuloj kaj poste por la «kudra rondo».

Por mi persone ŝi estis tre bona amikino. Ni interkonatiĝis jam en Boldern 1965. Ni kune vizitis KELI-geamikojn en Praha, Budapeŝto kaj en Anglujo.

Ŝi multe mankas al mi/ni, sed ni ne envias al ŝi la belan ripozon post fidela kristana laboro. Krome ŝi la lastan tempon de sia longa vivo multe suferis pro malsanoj.

Mi ĉeestis la funebran Diservon la 26an de aprilo en la preĝejo de Grycksbo.

Harry PERSSON 1918–2002

Nia esperantosocieto en Gotenburgo la 26an de aprilo perdis fidelan membron. Tiel longe kiel li povis, Harry partoprenis niajn kunvenojn kaj kursojn; ĉiam afabla, pozitiva kaj kun solida kredo kaj fido al Dio.

Li fariĝis esperantisto almenaŭ antaŭ 50 jaroj. Persone mi ekkonis lin meze de la 60aj jaroj kiam mi mem aperis inter la esperantistoj en Gotenburgo. Ni laboris kune en la loka KELI-klubo ĉi tie ĝis ĝia ĉeso post 20 jaroj.

Li partoprenis la KELI-kongreson en Jönköping 1975. I.a. li amuzigis nin per sia muziko de buŝ-harmoniko. Mi

ŜARADO

El la silaboj

a – bo – de – di – ek – fa – ge – gi – go – i – je – ko – ko – le – li – lo – mi – mo – ni – no – no – o – o – or – or – pa – ra – re – sar – te – tur – u – zi

formu 9 vortojn kun la subaj difinoj. El la komencaj literoj legataj de supre malsupren rezultas la Apostolaj leteroj.

1. kristana societo, 2. fikcia rakonteto, 3. sankta bildo, 4. antikva ŝtona ĉerko, 5. latina dankhimno, 6. konsekri, 7. aranĝo de diservo, 8. granda muzikinstrumento, 9. unu el la grandaj profetoj.

Solvo de la vortserĉludo

horizontale:
Luko, De Judas, De Jakobo, Al Tito.
vertikale:
Marko, Mateo, Dua Petro.
diagonale:
La Agoj, Al Filemon, Apokalipso.

pensas ke la familio TUINDER rememoras liajn aranĝojn por ili post la kongreso survoje al kaj en Partille, ĉu ne?

Harry mankas al ni, kaj ni estas dankemaj ke ni tiel longe havis lin inter ni.

Mi estis inter la ses klubanoj kiuj partoprenis la funebran solenaĵon en la Misia preĝejo de Sävedalen la 8an de majo.

Britta REHM



ŜI VENAS EKSTEREN

Ŝi venas eksteren
el sia domo
por prepari
bonan manĝon

brulas la fajro
jam muzikas
kaj aŭdeble spiras
inter la ŝtonoj

venu eksteren
ankaŭ vi
kaj legu
nutru vin
la Spirito
kiu spirante
donas animon
al la vorto
flustrante
lispante
en la vento

ĉu en tiu tago
ne pelis la Spirito
— kiel en ŝtormo —
la disĉiplojn
el la domo
eksteren?

fotis kaj verkis: C. DE VLAAM
tradukis: Jacques TUINDER